## Nekrologo

La 26-an de novembro 2007 forpasis *Siegfried Stampa*, la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, kiun li kontribuis por la centjariĝ-omaĝa festkajero de Scienca Revuo. Bedaŭrinde li ne plu spertis tiun ĉi Esperantan version, same kiel li ne spertos la aperon de du pliaj manuskriptoj el lia plumo, kiuj kuŝas sur mia skribotablo.

Esperanto estis por la veterinaro-sciencisto, kiu pli ol 40 jarojn vivis kaj esplorlaboris en Afriko, tute nova sperto. Komence li ja iom ridetis pri mia engaĝiĝo pri kaj por Esperanto, ĉar por enmigrinto en anglofonan landon certe la angla estas "la" internacia lingvo. Sed baldaŭ ni ludis skramblon – kompreneble per Esperantaj vortoj. Mia traduko de lia libro *"Jim der Leopard"* en la Esperantan version "Ĵim' la migrulo" (laŭ la origina titolo de la aŭtoro) plene konvinkis lin pri la taŭgeco de la Internacia Lingvo ankaŭ en la esprimo de tiklaj tradukoj de maloftaj situacioj ĉe la roluloj, ĉu bestaj ĉu homaj. Lia forpaso lasis solaj liajn edzinon, 5 infanojn kaj 12 genepojn, loĝantajn en Sudafriko, Aŭstralio kaj Kanado. Same forte trafis min la perdo de iama kunstudento, kolego kaj amiko post longa kaj riĉa vivotempo kiel ĝi aperas sur la malantaŭa kovrilpaĝo de lia verko pri la aventuroj de juna leopardo en Afriko:

"D-ro *Siegfried Stampa*, naskita la 4-an de aprilo 1925, studis veterinaran medicinon ĉe la universitato de *Giessen*, Germanio. En la jaro 1953 li ricevis stipendion de la sudafrika registaro, studis unu jaron ĉe la veterinara esplorinstituto *Onderstepoort*, fariĝis poste scienca kunlaboranto en farmakologia firmao kaj docentis kiel asociita profesoro en la universitato de *Fort Hare*, la unua terkultura klerigejo en Sudafriko por neblankaj ŝtatanoj. Por ne perdi la rilaton inter scienco kaj praktiko, li dum multaj jaroj praktikis kamparan bestkuracadon. Per tiuj agadsferoj li intime konatiĝis kun Sudafriko. Lia kapableco starigi kontaktojn kaj lia amo por homoj kaj bestoj malfermis al li senperan aliron al la indiĝena rura loĝantaro. Li aplikis kaj disdonis al aliuloj sian profundan konon de sciencaj metodoj en propraj agrikulturaj aktivadoj, verkis librojn kaj kunlaboris per artikoloj por Scienca Revuo."

Pro lia funda parazitologia fakscio el praktiko kaj esplorlaboro, kaj pro lia kono de la latina kaj greka lingvoj, mi esperis esti gajninta kunbatalanton por planita kompedio pri parazitologio kun tiom da specialaj biologiaj fakvortoj, por kies terminaro nek PIV nek aliaj Esperantaj vortaroj sufiĉas. Scienca Revuo perdis fakkompetentan aŭtoron kaj la esperantlingva scienco perdis spertan kunlaboranton.

*Prof. Dr. R. Sachs*, prezidanto de ISAE





# Fokuson sur parazitologio[1]

*Rüdiger SACHS*

## Enkonduko

Ĉiuj animaloj – inkluzive de la homo – havas komunan problemon, nome la nutraĵ-akiradon. Nur se ili tion sukcese solvas, povas esti efektivigataj la aliaj vivofunkcioj, kiuj estas necesaj por konservado de la specio. Ĝenerale la malgrandulo, la pli malforta estas predo por la grandulo kaj la pli forta estas, ekologie, la rabisto. Postviva ŝanco por la malpli forta specio tamen estas la parazita partoprenado ĉe la manĝo de la granduloj aŭ eltiri la bezonatan manĝaĵon rekte de ties korpo. El tio originas la pensinstigo, ke la parazitoj evoluis, ĉe koncerna dispozicio, el primare en la libera naturo vivantaj organismoj. Kaj poste disvolviĝis pluraj kaj tute diversaj vojoj al parazitismo. Laŭ la hodiaŭa scio kaj konsiderante la lastajn esplorojn pri specioevoluado oni diferencigas inter ektoparazitoj kaj endoparazitoj, depende de tio, ĉu la parazitaj organismoj preferas vivi sur la korposurfaco aŭ en la haŭto, aŭ ĉu ili setladas en organojn aŭ organsistemojn ene de la korpo.

## Ektoparazitoj kaj endoparazitoj[2]

Ektoparazitoj povas lokfiksite aŭ mallongtempe paraziti siajn gastigantojn, ekzistas tamen transiroj inter tiuj du vivomanieroj. La vojo al endoparazitismo eble okazis per tiaj ektoparazitoj aŭ kunmanĝantoj, kiuj trovis siajn vojojn en la intestokanalon aŭ aliajn korpokavaĵojn – kun la rezulto, ke nuntempe fakte ĉiuj vertebrulorganoj estas trafitaj de parazitoj. La enĉela parazitismo, kies kaŭzantaj malsano-organismoj vivas en sangoĉeloj aŭ aliaj korpoĉeloj, estas specifa formo de la endoparazitismo kaj antaŭkondiĉas koncernan dispozicion, ekz. malgrandegecon kiel efektiviĝas ĉe unuĉeluloj.

------------------

[1] Prelego dum la centjariĝfesto en Tavoleto, detale pritraktita kaj "spicita" per 36 diapozitivoj.
[2] "ekto-" (Gr. *ektos* = ekstere); "endo-" (Gr. *endon* = interne).